

sub la suda kruco ★
decembro 2017

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25 [4] numero 129 decembro 2017

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero


15-a de februaro 2018

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Marcel Leereveld dum kongresa ekskurso en Melburno

- 
- 5.** La Tragedio de Orfeo kaj Eŭridicia (helena legeno)
 - 6.** Se la diablo vere ekzistas, kie li troviĝas?
 - 9.** Julie Lois Regal (1920 – 2017)
 - 10.** Kristnaskan Vesperon 1955
 - 12.** Ekskursoj en Indonezio
 - 17.** Recenzo: *Idoj de la Imperio* de Kalle Kniivila
 - 18.** Bondezirojn al Marcel Leereveld
 - 26.** Konsultado kaj obeado (parto 2): Parizo parolas
 - 29.** Promesplena paŝo pri instruado de Esperanto

decembro, du mil deksep

Karaj legantoj

Vi havas en viaj manoj eble la antaŭlastan numeron de ESK. Mi certas ke vi memoras ke en la pasinta numero mi demandis ĉu iu alia pretas redakti ĉi tiun mondkonatan revuon. Malfeliĉe neniuj volontulis ĝis nun. La venonta marta numero estos mia lasta kiel redaktisto, kaj eble la lasta en la historio de nia movado.

Se ricevi ĉi tiun belan revuon kvarfoje jare donas al vi grandan plezuron, mi atendas vian retmesaĝon. La tasko estas tre facila: verki ĉi tiun antaŭparolon, mondvojaĝi por verki interesan artikolon pri iu bela vizitinda loko, kaj kontroli artikolojn

de aliaj kontribuantoj. Vi bezonas nur komputilon, retadreson, kaj Microsoft Word aŭ similan. Vi ne ricevos salajron, sed vi ricevos laŭdon de ĉiuj niaj legantoj en Nov-Zelando, Aŭstralio, kaj en aliaj mondpartoj.

En ĉi tiu numero ni sendas grandan gratulon al Marcel Leereveld el Melburno. Marcel centjariĝas. Ne multaj el ni atingos tiun aĝon. Marcel estas tre aktiva en nia movado kaj ni gratulas lin pro lia kontribuo al nia lingvo internacie kaj precipe en ĉi tiu mondparto. Ĉi tie aperas laŭdoj de multaj esperantistoj kaj vi rimarkos ke ofte aperas la vorto 'admiras'. Feliĉan naskiĝtagdatrevenon, Marcel!



Eble post mia emeritiĝo kiel redaktisto de ESK, mi ferios en ĉi tiu Pacifika paradizo. Ĉu vi scias kie estas ĉi tiu loko?

La Tragedio de Orfeo kaj Eŭridicia (helena legeno)

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

Orfeo estis la plej eminenta muzikisto en antikva Helenujo. Filo de la muzo Kaliopa, li estis duondia, dotita de sia patrino per miraklaj kapabloj en muziko. Li posedis oran liron, donacon de la dio Apolono, kaj kutime vagis ofte muzikante per liro kaj voĉo, laŭ la arboriĉaj flankoj de famaj grekaj montoj kiel Rhodopo, Parnaso, kaj eĉ Olimpo!

En ĉi tiuj vagoj li estis tute sekura ĉar sovaĝaj bestoj – leonoj, ursoj, kaj serpentoj – kaj eĉ cervidoj – kune aŭskultis silente kaj interpace! Ankaŭ pli danĝeraj predantoj: banditoj kaj similaj proskribitoj estis same pacigitaj. Kaj ne nur uloj, sed aĵoj! Riveretoj ĉesis flui por aŭdi, la arboj kaj arbustoj klinis sin, aŭskultante. Birdoj ĉirkaŭflugis, senkante!

Tamen, Orfeo havis aliajn kvalitojn. Li estis unu el tiu bando de herooj kiuj iris kun Jasono por akiri la Oran Ŝaflanon. Li prenis unu el la kvindek remilokoj de la Argo, kaj ofte kuraĝigis la aliajn remantojn per siaj kantoj.

Reveninte eĉ pli fama, li ree vagis tra siaj hejmaj montoj, sed nun li sentis ke io mankas, sed kio? Kiam li renkontis la belan junan nimfon, Eŭridicia, li sciis! Ja tuj ili enamiĝis kaj ili tre baldaŭ planis geedziĝi. Fine venis tiu feliĉa tago kun multaj gastoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj nature muziko kaj dancado sur la gresa korto!

Dum Eŭridicia dancis gaje kaj gracie, ŝi subite stumblis kaj kun krieto falis teren. Ŝin mordis venenega serpento kaj post nur tri minutoj ŝi

mortis. Orfeo staris kelkan tempon kiel muta statuto super sia perdita amatino kaj tiam forkuris freneza en la arbarojn kun sia liro. Poste, diversaj solecaj lokoj aŭdis ĝian korŝiran muzikon. Sed Orfeo ne nun vagis sencele. Li serĉis la vojon al Hadeso, lando de la mortintoj.

Fine, post longa serĉado, li staris antaŭ la forpela, fera pordego. Sub la ordonaj tonoj de la liro, ĝiaj baroj malŝlosis sin. Tiam li estis ĉe la nigra rivero, Stikso, ankoraŭ muzikanta. Antaŭe estis la malluma mortolando. Tie staris la eterna pramisto, Ĉarono, kiu silente transigis lin, kvankam li ne havis la kutiman moneron por pagi. Ĉe la alia bordo li renkontis la ferocan, tri-kapan hundegon, Cerbero, kies devo estas bari la vojon al vivuloj. Sed tiu kaŭris kviete sub la muzikfluo kaj Orfeo povis antaŭeniri sur la malluma vojo. Ĉirkaŭe nun moviĝis la palaj formoj de la mortintoj kaj videble for estis la torturejoj de la damnitaj. Tamen, Orfeo ignoris ĉion. Li celis la palacon de la reĝo, Plutono. Kaj kiam li atingis tiun nigran domon, lia muziko donis al li vojon eĉ al la reĝa trono kie sidis Plutono apud sia reĝino, Persefona, forkaptita el la bela, luma supra mondo.

Orfeo kuraĝis stari alta antaŭ la malhela, timiga vizaĝo, muzikante mallaŭte sed kortuŝe persvade kaj li kantis sian petegon:

*Aminda Eŭridicia, amata kaj amanta
Freŝa floro ŝi, kiel ĉi momente aperanta
Tiel gracia ŝi ĉu brizo ŝin balancanta?
Ŝi ĉiam emis bonon fari al ĉiuj renkontotaj.*

*Kiom perdos la mondo se estos ŝi mankanta?
Kie estos la brilaj infanoj de ŝi naskotaj?
Ĉu ne eraris la sorto kiam ŝin prenis ĝi?
Sen ŝi, vivado soleca ne utilas al mi
Se perdi mi devas, ankaŭ min prenu vi
... tiam eterne kunestos ja ni!*

Ĉu la granita vizaĝo aspektis iomete malpli severa? Persefona klinis sin kaj flustris ĉe lia orelo. Silento regis kelkajn minutojn. Tiam elsonis lia voĉo kiel martelo sur metalo tra tuta Hadeso: 'Jes, ĉi tiun solan fojon vi rajtas rehavi ŝin. Sed aŭskultu bone la regulojn. Vi devas turni vin nun kaj reiru laŭ via vojo ĝis la sunbrila mondo, sen eĉ unu fojon turni la kapon aŭ paroli. Eŭridicia sekvos'.

Orfeo, tremanta pro espero, turnis sin kaj ekiris sur la longa vojo: tra la tuta malluma Hadeso, preter Cerbero, kun Ĉarono trans Stikso, kaj dum ĉiu paŝo, torturis lin la penso: ĉu vere Eŭridicia estas malantaŭ li? Li memoris ke dioj foje mensogas!

Nun fine li staris antaŭ la fera pordego. Tra la baroj li povis vidi la belan sunbrilon. Li ja devis scii: ĉu ŝi estas tie? Unu rapida ekrigardo – li turnis sian kapon – momente vidis

ŝian formon antaŭ ol ĝi forvaporigis, neniam plu vidota de vivulo!

En la suna mondo Orfeo vagis denove en siaj arbaroj sencele kaj senkonsole. Lia muziko nun plaĉis al neniu kaj li ĉiam konsciis pri sia propra kulpo. Li kutime evitis aliajn homojn, precipe gajajn. Dum li kaŝis mizere en bosko, li aŭdis kreskantan bruon de multaj homoj – konfuzitaj kriegoj, kantado, kriĉado, rido, ploroj. El la arbaro aperis svarmaĉo de menadoj (ebriegaj adeptinoj de Bakĥo). Vidinte lin, ili kriaĉis ke li venu kun ili. Abomenita, Orfeo forkuris. Freneze kolerigitaj pro tio, ili ĉasis lin kiel sovaĝan beston. Ili ĵetis ŝtonojn kiuj faligis lin kaj tiam atakis lian senkonscian korpon sovaĝe. En ilia ebria feroco, kaj nun sangavido, ili tute dispecigis ĝin. Ili ĵetis la pecojn en apudan rivereton kiu portis ilin en la maron.

Oni diras ke lia kapo surbordiĝis ĉe la insulo Lesbos, ankoraŭ murmurante la nomon Eŭridicia. La muzoj enterigis ĝin tie kaj la loko iĝis fama sanktejo memore al Orfeo.

Se la diablo vere ekzistas, kie li troviĝas?

BOB FELBY (ADELAJDO)

Io kio okazas al mi sufiĉe ofte estas ke iu uzas min por esprimi siajn opiniojn. Kelkfoje ŝajnas al mi ke li/ŝi pravas, sed pli ofte ŝajnas al mi ke tio kion li/ŝi diras estas la malo de tio kion la vivo instruis al mi. Ĉu mi tro malbone komprenas la voĉojn de ne nur miaj multaj instruistoj, instruantoj kaj instruintoj, aŭ ĉu

ekde nun mi ne plu blinde kredu ion ajn, sed provu uzadi mian propran intelekton.

Ekde kiam mi, ĉi tiun fojon, reenkariniĝis sur tiu ĉi, ankoraŭ tiam, bela planedo kiel unu el la iomete pli evoluintaj kreitoj, almenaŭ kompare kun la bestoj kaj plantoj, mi aŭdis de miaj gepatroj, instruistoj kaj nur

Dio scias de kiom da aliaj homoj kiuj asertis ke ni, la erare nomataj homoj, estas multe pli evoluintaj kaj kleraj ol la bestoj kaj plantoj. Sed, ni restu klarmensaj! Multaj el tiuj “homoj” estis alkoholĝuantoj kiuj fumis, eĉ fumadis, kaj malpurigis kaj venenigis la aeron kiun aliaj homoj estas devigataj enspiri. La plej multaj el ili ŝatis manĝi kruele mortigitajn korpojn de senkulpaj nedefendopovaj bestoj. Mi mem kulpas. Mi ja manĝas la korpojn de kruele mortigitaj plantoj. Sed, el du malbonoj, kiun oni elektas, se oni havas ankoraŭ iom da kompato en si? Kompreneble oni elektas la malpli malbonan, do la pli bonan, ĉu ne? Saĝuloj ne elektas la pli malbonan! Ĉar ni naskiĝas kun neperfekta korpo homsimila, sed plej ofte ne perfekte homa, ni estas ja devigataj manĝi ion, ĉar necesas ne nur al ni mem, sed al la cetera homaro, ke nia korpo estu sana kaj sufiĉe forta por ke ni povu kapabli esti bonaj kaj servopretaj al ĉiuj aliaj kreitoj sur la planedo. Ni devas manĝi. Tio estas nur unu el la kondiĉoj por vivi ĉi tie! Kaj ni manĝas. Plej ofte pli kaj tro ol ni vere bezonas, pro la fakto ke la manĝaĵo bongustas. Al viandomanĝantoj, do karnovoruloj, bongustas eĉ la mortintaj korpopartoj de niaj multaj gefratoj, la bestoj!

Sed iuj el ni sentas sin kulpaj, kaj tial ne feliĉaj, pro la kruela traktado al la bestoj kaj plantoj. La kruelecojn faras plej ofte ne nur la manĝantoj, sed plej ofte tiuj kiuj memame volas pliriĉiĝi per la

suferoj, timegoj kaj doloroj de tiuj niaj gefratoj, la bestoj kaj plantoj, kiuj ja estas tute sendefendopovaj kontraŭ tiu krueleco de tiuj kreitoj, kreitaj ĝuste por defendi la rajtojn de la bestoj kaj plantoj. Nu, kion vi pensas pri tio?

Ni ĉiuj lernis ke la homoj estas la plej evoluintaj el ĉiuj kreitoj. Nu, tio ŝajnas al mi, ne la tutan tempon kompreneble, sed tamen pli kaj pli ofte, granda eraro, eĉ mensogo! Juĝante laŭ la fikonduto de la homoj sur tiu ĉi planedo, oni povus komenci kredi je la Infero kaj Diablo. Tiuj el ni kiuj aŭskultas al nia interna voĉo, do nia konscienco, aŭdadas ja ke kaj la bestoj kaj la plantoj estas multe pli evoluintaj ol ni, la neevoluintaj fihomaĉoj, ĉu ne? Ni ĉiuj, homoj, bestoj kaj plantoj naskiĝas sur tiu ĉi planedo, tio estas fakto nedubinda. Sed fakto estas ankaŭ ke nur ni homoj faras ĉion, kion ni kapablas por detrui tiun iam treege belegan planedon, paradizon por ni ĉiuj! Do por tiuj el ni, kiuj ne kredas je la ekzisto de la Diablo, mi rekomendas, rigardu nur en vian propran koron. Eble vi vidos la Diablon sidantan tie!

Tiuj el vi, kiuj dubas ke infero ekzistas, demandu nur kiun ajn beston kiun vi renkontas, ĉu fiŝon, kokinon, virkokon, porkon, ŝafon, bovinon, kaj multajn aliajn, ĉu ili kredas je la Infero. Ne surprizus min, se ili ĉiuj respondus, ke ili ja naskiĝis en Infero. Ni ne scias kio ili estis kaj kion ili faris en sia antaŭa vivo, sed certe estas ke ili grave, eĉ gravege, krimis kontraŭ

kelkaj el siaj gefratoj kaj nun devas suferi vivon en Infero! Tiu planedo estas do, laŭ la opinio de la bestoj, la Infero! Almenaŭ ĝi sendube estas por la bestoj multe pli malbona kaj terura ol la koncentrejoj de la nazioj dum la 2-a mondmilito. Kiom longe daŭros ĝis la homaro lernos ion kaj moviĝos antaŭen kaj supren laŭ la ŝtuparo de evoluado?

Mi neniam vidis, aŭ aŭdis pri bestoj, kiuj devigas eĉ tiujn el ili, kiuj estas pacpreferantoj, eliri kaj mortigi ĉiujn aliajn bestojn nur por ke nur malmultaj el ili fariĝu multe pli riĉaj pro la mizero de aliaj. Bestoj ne estas tiaj. Rigardu nur la hundojn, katojn, porkojn, ĉevalojn, jes kiun ajn beston sur la planedo, neniuj el ili estas tiom memamaj, tio estas egoismaj, kiom la homoj. Kaj tion saman oni ja povas diri ankaŭ pri la plantoj. Mi ankoraŭ neniam vidis grandajn armeojn da arboj marŝantaj kun tamburoj kaj trumpetoj nur por konkeri unu alian arbaron post la alia. Nuntempe mi sincere dubas ĉu marŝos Trumpeto en la antaŭo de iu ajn armeo. Neniu Trumpeto kuraĝus fari tion. Tio povus esti danĝera al ĝi/li, ĉu ne? Pli bone ke aliaj homoj, eĉ bonuloj, risku siajn vivojn, sed ne la Trumpeto. Li preferas resti hejme. Laŭ lia opinio pacamantaj junuloj devas riski siajn vivojn tiom longe kiom li mem povas resti hejme sentante sin grandega heroo! Plantoj kaj bestoj estas do multe pli alte evoluintaj ol almenaŭ multaj el ni kompatindaj homoj, ĉar ni ankoraŭ staras sur la plej malalta ŝtupo de la evolua ŝtuparo. Ĉu vi

ne konsentas? Eble niaj instruistoj devus ekinstrui la neceson sekvi la ekzemplojn de la bestoj kaj ne tiun de la homoj!

Tiun ĉiaman laŭdon, eĉ filaŭdadon, al niaj ĉiamaj kaj kruelaj militoj naŭzas min same kiel oni laŭdas la buĉadon de bestoj!

Necesas do ke ni faru ion. Sed kion ni faru? Ĉu ni provu seniĝi de tiuj, kiuj kredante ke ili, instruante al ni mensogon post mensogo, helpas nin? Jes, eble bona ideo, sed tiu seniĝo devas ja okazi sen la kruela kaj stulta perforto, kiujn tiuj instruantoj, kaj kompreneble ankaŭ konsilantoj, kiujn ili obeas, rekomendas kaj preferas, kompreneble tiom longe kiom ili mem rajtas resti hejme ĉirkaŭataj de gardistoj! Ni estas ja, ĉiuj el ni, respondecaj pri niaj propraj agoj kaj devas do esti ankaŭ bonaj ekzemploj por ĉiuj aliaj!

Ĉu vi do kuraĝas preni respondecon por viaj agoj? Ĉu vi kuraĝas aŭ ne faras neniun diferencon, vi ja estas respondeca, kaj estos juĝata laŭ ĉiuj viaj agoj. Jes, ankaŭ mi timas la estontecon!

Ĉu vi deziras pli bonan estontecon? Se ne por vi mem, ĉu eble por viaj gefiloj kaj genepoj? Estas grave, eĉ gravege, ke vi kiom eble plej baldaŭ ekkomprenu ke vi respondecas ne nur pri ili, sed pri ĉiuj el ni vivantaj sur la Tero! Ni venis ĉi tien por lerni, ne por esti kruele mortigitaj sur la sangokovritaj batalkampoj, erare nomataj honorkampoj de la tro multaj mensoguloj!

Julie Lois Regal (1920 – 2017)

KATJA STEELE (ADELAJDO)



Julie estis de sia junaĝo kaj esperantisto kaj bahaano. Ŝia patro Arthur Elmore Regal iĝis bahaano pere de Esperanto. Li iam trovis broŝuron pri Esperanto kaj ekstudis de ĝi la lingvon kaj poste lasis la aferon 25 jarojn ĝis en 1932 li ekstudis serioze. Julie skribis pri la okazaĵo jene:

"Estis la komenco de 1932 kiam mia patro ricevis la libron BAHĀ'U'LLĀH AND THE NEW ERA, kiu gvidis lin kaj mian patrinon aliĝi al la bahaa kredo. Estis la E-versio de la sama libro, per kiu li la antaŭan jaron komencis entuziasme studi Esperanton. 'Kial vi elektis tiun libron kun la stranga nomo?' - mi demandis mian patron. 'Ĉar ĝi estis tradukita en Esperanton de la filino de Dr. Zamenhof' li respondis."

Je mia grandega surprizo baldaŭ mia patro sekvadis mian patrinon tra la domo laŭtleĝante al ŝi pecojn el la libro kaj ili ambaŭ esprimis admiron. 'Jen tio kion devus instrui religio!' proklamis mia patro.' 'Jen tio kion mi atendis dum mia tuta vivo' respondis mia patrino."

Julie studis por esti sekretariino kaj eklernis ankaŭ la hispanan, kio gvidis ŝin al kvin-monata vojaĝo al Meksikio. La tieaj spertoj inspiris ŝin vojaĝi al Panamo por helpi tie la bahaan movadon dum ŝi laboris por la usona armeo kaj poste mararmeo kiel sekretariino. Sekvis du jaroj en Wilmette kie ŝi laboris por la tiea Nacia Bahaa Centro.

Ŝi havis mallongan, malfeliĉan geedziĝon, el kiu naskiĝis ŝia sola infano, Diane. Divorcita, ŝi diligente laboris por doni al sia infano kiel eble plej multe. Diane, kiu ankaŭ lernis Esperanton, memoras:

"Ŝi havigis al mi naĝ-, balet-, piano-lecionojn, prenis min al vojaĝoj, kien miaj samaĝuloj ne iradis: al Meksikio du foje, al la unua Tutmonda Bahaa Konferenco en Londono (1963,) kaj ankaŭ al Bahaa pilgrimado al Israelo en 1970. Mi renkontis neniun alian kiu pensis pli pri kiel plibonigi la mondon. Ŝi kredis je la transforma mesaĝo de bahaismo kaj ankaŭ je Esperanto kiel granda forto por unuigi la mondon."

Dum 1980-83 Julie volontulis por la bahaa movado en Nikaragvo. Ŝi vojaĝis tien kun du kofroj da havaĵoj. Tiujn ŝi devis paki ĉiun trian monaton kaj eliri el la lando por peti novan 3-monatan enirvizon, ne sciante ĉu ŝi ricevos ĝin aŭ ne. Dum la jaroj en

Nikaragvo ŝi agis ankaŭ por Esperanto kaj fakte komencis la tiean E-movadon. Post tri jaroj en Nikaragvo ŝi ekpioniris bahaismon en Meksikio kaj restis tie ĝis sia 81-a jaraĝo (2001). Ankaŭ tie ŝi partoprenadis la E-vivon kaj instruis Esperanton. En 1986 ŝi partoprenis la UK-on en Ĉinio kun sia bofilo Paul Friedman-Regal (iam Prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio) kaj lia filino Amy. Julie vojaĝis al Bergen (Norvegio), Prago (Ĉeĥio), Ateno (Grekio), Oregon (Usono), kaj en 2001 ŝi partoprenis la Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto en Meksik-urbo.

En novembro de 2001 ŝi ekloĝis

en Tauranga en Nov-Zelando kun la familio de Diane kaj ankaŭ tie daŭrigis esperantumi. Tri monatojn post kiam ŝi iĝis novzelanda civitanino (2006) la tuta familio venis en Aŭstralion. Eĉ en alta aĝo Julie ankoraŭ parolis pri Esperanto dum biblioteka prelego en 2009. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj en la jaroj 2006 ĝis 2016 ĝia delegito por Terrigal, Novsudkimrio.

Komence de 2017 ŝi falis kaj rompis sian pelvon. Ŝia vojaĝo el Chicago tra Illinois, Panamo, Nikaragvo, Meksikio, Nov-Zelando, kaj Aŭstralio finiĝis pace dum ŝia dormo la 4-an de junio 2017.

Kristnaskan Vesperon 1955

BOB FELBY (ADELAJDO)

Eble iuj el vi ankoraŭ memoras ke iam mi, pro mia emo konservi mian bonan konsciencon, pasigis du bonegajn kaj belegajn jarojn en unu el la plej belegaj lokoj en Danujo.

Nur proksimume 40 kilometrojn iom norde de Kopenhago situas grandega arbaro kun ne nur majestaj arboj, sed ankaŭ majestaj bestoj. Mi amis loĝadi kaj laboreti tie. Tio estis multe pli bone ol laboraĉi en malpurega fifabrikaĉo en Kopenhago!

Fine de decembro 1955 estis malvarma vintro en Danujo. Mia patro en Kopenhago estis demandinta min, ĉu mi povus ĉi tiun jaron provizi la familion per belega kristnaska arbo. Kompreneble mi konsentis.

En la arbarego mi jam estis trovinta belegan etan kristnaskan arbeton. Laŭ mia modesta opinio ĝi estis perfekta por mia familio. Iun vendredan vesperon meze de decembro mi eliris el la labortendaro portante kun mi hakilon

kaj segilon. Estis mallume, sed feliĉe mi bone, eĉ bonege, konis la vojon.

Mi trovis la arbeton al kiu mi jam estis enamiĝinta. Tie ĝi staris inter multaj aliaj arboj, sed mia amatino estis sendube la plej belega.

Mi devas konfesi, ke doloris al mi en la koro dehaki ŝin for de la tero. Ŝi falis teren kaj mi forsegis iom de ŝia malsupra parto, ĉar mi timis, ke kvankam ŝi estas nur arbeto, ŝi tamen estas iomete tro alta por la ĉambro de miaj gepatroj.

Tiam mi portis ŝin al la stacidomo en la arbaro. Belega stacidomo konsistanta el benko kaj ligna muro malantaŭe. Decas menciis, ke estis ankaŭ ligna tegmento super la benko.

Mi metis mian amatinon malantaŭ la lignan muron kaj reiris kun la hakilo kaj segilo al la labortendaro, en kiu jam dormis ĉiuj miaj bonaj kamaradoj.

La sekvan matenon, post la matenmanĝo, ni ĉiuj foriris for de la

labortendaro al Kopenhago, escepte de tiuj kelkaj, kiuj ne loĝis en Kopenhago. Danlando estas, kvankam malgranda, tamen pli granda ol nur Kopenhago.

Mi enmetis la arbeton en la vagonaron kaj sidigis min inter miaj bonaj kamaradoj kaj konversaciis amuze kun ili.

En Kopenhago ni ĉiuj eliris, kaj mi kunportis mian arbeton el la vagonaro kaj sur la straton. Mi atendis ĉe la tramhaltejo kun la arbeto, kaj la tramo alvenis. Sed, ho ve, kaj bedaŭrinde! Mia amata arbeto estis, laŭ la opinio de la tramkonduktoro, multe tro alta por esti en la tramo. Mi do estis devigata piediri kun la amataĵo la longan vojon al la luloĝejo de miaj gepatroj en kvartalo Sudhaveno.

Alveninte tien mi suprenportis ĝin al la dua etaĝo kaj sonorigis la sonorilon. Malfermis la pordon mia patro. Vidinte la arbeton li ekkriis: “Kio en la mondo estas tio? Ĝi estas tro grandega!” Diris mi, ĉar mi sentis min spertulo pri tiaj aferoj: “Se ĝi estas tro grandega, forsegu iom de ĝia malsupraĵo!”

“Portu ĝin en la kelon, morgaŭ mi forseguos iom de ĝi”, diris mia patro. Kaj mi portis ĝin en la kelon.

Post ioma kaŝtrinkado ktp. mi foriris per la tramo al mia treege malgrandega ĉambreto en kvartalo Frederiksberg en Kopenhago.

Venis la 24a de decembro. Mi iris kun kelkaj kristnaskaj donacaĵoj al la luloĝejo de miaj gepatroj. Tie, preskaŭ tuj apud la varmiga forno, staris mia amata arbareto. Ĝi nun, kun sia grandega stelo, atingis la plafonon, do ĝi fakte ne povis esti nomata arbeto, sed arbego. Ĝi estis belega kun multaj ornamaĵoj kaj kandeloj.

En la luloĝejo estis jam miaj geonkloj kaj gekuzoj, miaj gefratoj kaj la gefiloj de tiuj, kiuj havis gefilojn. Post la komuna

manĝado de la kristnaska manĝaĵo konsistanta el viando, kompreneble, sed mi ne manĝis tion, mia patro movis la tablon kaj seĝojn for de la mezo de la ĉambro kaj metis la arbegon en la mezon.

Nun ni ĉiuj, escepte de mia patro, devis eniri la kuirejon kaj atendi tie, ĝis mia patro estis fininta la taskon prepari la arbegon. Fine li malfermis la kuirejan pordon dirante: “Nun vi ĉiuj rajtas eniri!”

Ni eniris. Tie, meze de la ĉambro staris la arbego kun ĉiuj kandeloj brulantaj kaj brilantaj. Multaj kristnaskaj donacaĵoj kuŝis sub ĝi. Ĉio estis bela, eĉ belega. Ni ĉiuj donis unu al la alia la manon, faris grandan ringon ĉirkaŭ la arbego kaj malrapide komencis ĉirkaŭiri ĝin kantante kelkajn kristnaskajn himnojn. Iom post iom la kantado, kiel ankaŭ la rondirado, fariĝis pli kaj pli rapida kaj ankaŭ la himnoj, kiuj sanĝiĝis de nur kristnaskaj himnoj subite fariĝis amuzaj kristnaskaj kantoj.

Post iom da tempo ni ĉiuj estis sufiĉe lacaj kaj haltigis la dancadon ronde de la arbego. Tion ĉesintaj ni sidigis nin ĉirkaŭ la tablo kaj komencis manĝi ĉokoladon kaj marcipanon. Unu el ni starigis sin, prenis unu el la kristnaskaj donacaĵoj kaj eklegis tion, kio estis skribita sur ĝi, ekzemple: “Feliĉan kristnaskon al Robert de Paĉjo”. Tio daŭris eĉ tre longe!

Sed fine ĉiu kristnaska donacaĵo estis disdonita kaj ni komencis iri hejmen. Mi mem iris hejmen kun miaj multaj kristnaskaj donacaĵoj per la tramo al mia tre malgranda ĉambreto en Frederiksberg kaj dormis bonege!

Tio okazis kristnaskan vesperon en 1955. El ĉiuj partoprenintoj en tiu festo restas nun nur mia kuzino Janni, mia frato Børge kaj mi.

Ekskursoj en Indonezio

KAM LEE (HOBARTO)

Kaverno de Pindul

La kaverno de Pindul lokas je proksimume 35 km sudoriente de Jogĝakarta kaj ĝi estis malfermita en 2010. La kaverno enhavas subteran riveron kies fonto de akvo estas la fonto Gedong Tujuh. La rivero ne malpleniĝas dum la seka sezono. La kaverno estas 350 metrojn longa, 5 metrojn larĝa, kaj averaĝe 4 metrojn alta inter la akva surfaco kaj plafono de la kaverno. La profundo de la rivero estas 5-12 metroj.

En la kaverno estas kolono formita de ligo antaŭ 1000 jaroj de stalaktito kaj stalagmito. Ankaŭ en la malplenaĵo estas stalaktito kiu estas la kvara plej granda de la tuta mondo. La cirkonferenco de ĝi estas sama kiel 5 homoj kun etenditaj brakoj kiuj tuŝas mano-al-mane.

Pindul devenis el “pipi gebendul” kiu en Esperanto estas “ŝvelanta vango”. La nomo de la kaverno originas laŭ legendo pri homo nomita Joko Singlulung kiu serĉis sian patron en la sovaĝejo, montoj, riveroj, kaj kavernoj. Enirante en unu el la kavernoj ĉe la vilaĝo Bejiharhi, lia vango tanĝis rokon kaj ĝi ŝvelis.

Aŭtobuse el Jogĝakarta, grupo de esperantistoj veturis al la kaverno. Portante naĝkostumojn kaj pruntedonitajn savjakojn, ni piediris al la kaverna eniro kie rivero fluis en la kavernon. Ĉiu el ni ricevis pneŭmatan internan aertubon plenigitan je aero kaj poste metitan sur la surfacon de la rivero kie la akva temperaturo estis sufiĉe varma.

Sidante en la truo de la flosanta cirkla aertubo, mia dorso kaj miaj brakoj kaj kruroj kuŝis sur la rando de la aertubo. Mi unue hezitis uzi la aertubon, sed poste mi estis konvinkita kaj dankema ke mi ne sinkos en la profundo de la rivero!

La aertuboj estis ligitaj kune per ŝnuro por formi ĉenon, por eviti disiĝon de membroj de la grupo. Per malrapida fluo de la akvo kaj regulaj tiroj de gvidanto, ni veturis tra la kvieti riverkaverno.

Veturinte kvardek metrojn en la kavernon ni estis en la mezluma regiono de la kaverno. Ni eniris la mezan parton de la kaverno kaj la loko estas tute malluma. Estas unika travivaĵo sidi en flosanta aertubo en tuta mallumo en la ĉeesto de multaj homoj en atmosfero de silento. Ni dependis tute de nia sperta gvidanto. Drivante plue laŭrivero, ni povis vidi la elirejon de la kaverno en la distanco kaj ankaŭ truojn en la plafono de la kaverno. Saluton al la lumo, ĉu ne!

Ni alvenis al la elirejo de la kaverno kie ni vidis la tutan lumon de la tago. Ni drivis al malprofunda parto de la rivero, eliris el la aertubo, kaj jen la fino de proksimume unuhora ekskurso tra la kaverno. Estas tre unika kaj memorinda travivaĵo.



Plaĝo de Sandranan

La plaĝo de Sadranan estas turista loko sur la suda marbordo de centra Javo je proksimume 80 km sudoriente de Jogĝakarto. Sandranan originas el la vorto "nyandran" kiu signifas oferon al Dio aŭ dankceremonio de fiŝistoj.

Veturinte 30 km suden per aŭtobuso el la kaverno de Pindul, ni alvenis al la plaĝo de Sandranan. Okcidente estas la mondkonata plaĝo de Krakal Plaĝo. Je la komenco mi rimarkis relative krutan plaĝon kaj grandajn kaj tre laŭtajn ondojn. Ĉeestis multaj homoj kiuj verŝajne estis tieuloj. Mankis fremdaj turistoj.

Admirinte la belan ĉirkaŭaĵon dum dekkvin minutoj, mi baniĝis kun aliaj. La akvo estis sufiĉe varma kaj la oftaj ondoj kapablis puŝi homojn el la maro kaj al la plaĝo kaj eĉ laŭ la sabla tero. Tamen okazis ankaŭ sufiĉe forta markurento kiu povas tiri onin maren.

En la regiono de neprofunda akva nivelo, estis ŝnuro kiun oni povas uzi

por helpi kontraŭ la forta kurento. Kelkaj naĝantoj uzis savjakojn.

Dum mi naĝis en la maro, granda motorboato trapasis min kaj poste mi informiĝis ke okazis sukcesa savado de homo tirit al la maro.

Kelkaj el miaj amikoj prunteprenis spirtubon kaj naĝis subakve, sed ili ne trovis multe. Verŝajne tiam flusis kaj la plej bona tempo por naĝi subakve estas dum malfluso.

De tempo al tempo mi kuŝis sur la plaĝo kies flavaj sableroj estis sufiĉe grandaj. La vetero estis tre bona kaj eble du kilometrojn for estis la bela insulo Watulawang. Laŭ la marbordo estis kelkaj konstruaĵoj, kies tegmentoj estis subtenitaj de lignaj stangoj. Kontraste al Aŭstraliaj plaĝoj, nevideblaj estis marsavgardistoj aŭ flagoj kiuj montras preferatajn naĝlokojn en la marbordo.

Poste, ni revenis aŭtobuse al Jogĝakarto. La sekvantan tagon ni reiris aviadile al Ĝakarto.





Seulo, Koreujo...

Jen bona filmo!
Kio nomiĝas
la ĉefaktoro?

Kiu

La ĉefaktoro
de la filmo.

Kiu

La viro
en la
filmo!

Kiu

Ni ĵus spektis filmon
en kinejo, ĉu ne?

Jes

Kaj mi nun
volas scii la
nomon de la
ĉefa, vira
aktoro.

Jes

Ĉu vi
scias lian
nomon?

Jes

Bone. Do, la nomon,
mi petas.

Kiu

La aktoro en
la filmo kiun
ni ĵus spektis!

Kiu,
sinjoro

La film-
viro!!

Kiu estas
lia nomo

Jen estas
mia
demando!

Mi ja
respondis

Vi ne
respon-
dis!!!

Sinjoro -- kiu
li estas?

Jes

Lia nomo
estas 'Jes'?

Ne

**KIO ESTAS
LIA NOMO!!?**

Ne, sinjoro. Kio ne
estas aktoro. Li estas
kantisto

Kio?!

Jes, sinjoro

Pri kio ni
parolas?

Jes

Ho, mi ĉesas! Mi aŭtos
hejmen. Ĉu mi alportas
vin al via domo?

Jes, dankon!
Kia estas via
aŭto, sinjoro?

Kia

Tre bone

FIN'

Aldono:

KIU

Lee Ki-woo
(이기우)
EO: / i ki-u /
Korea
filmaktoro



KI-O

(키오)
Eks-ano de korea
kantbando, 'Speed'
Alia nomo: O Seung-ri



KIA

Korea
aŭtomobilo



Recenzo: *Idoj de la Imperio de Kalle Kniivila*


DAVID RYAN (WELLINGTON)

Idoj de la Imperio estas interesa libro eldonita en 2016 pri pli ol miliono da ruslingvanoj kiuj loĝas en la baltaj ŝtatoj (Estonio, Latvio, kaj Litovio). Verkis ĝin Kalle Kniivila, finna esperantisto kiu nun loĝas en Svedio, iama redaktisto de *TEJO Tutmonde* kaj estrarano de UEA. Li ankaŭ verkis en Esperanto du aliajn librojn pri rusaj aferoj: *Homoj de Putin* kaj *Krimeo estas nia*.

Dum la komunista periodo Moskvo regis tiujn landojn. Tie loĝis multaj rusdevenaj homoj kaj ĉiuj tieaj enloĝantoj devis lerni la rusan lingvon. Post la falo de la Sovetunio, tiuj tri landoj sendependiĝas kaj la loka lingvo (estona, latva, kaj litova) oficialiĝis. Tiam ekis problemoj por la tieaj ruslingvanoj ĉar la patrolando (Rusio) ne plu havis influon kaj la rusa lingvo ne plu havis oficialan statuson. Ne ĉiuj tieaj rusoj scipovis la lokan lingvon kaj la vivo subite iĝis multe pli malfacila ĉar ili sentis sin kiel nedezirataj kaj membroj de diskiminaciata minoritato. Oni komencis vidi ilin kiel riskon por la landa sekureco kaj grupon kun dubinda lojaleco.

Tiu fakto estas verŝajne pli grava por maljunaj rusoj kiuj migris al la baltaj landoj el aliaj partoj de la Sovetunio kaj neniam devis lerni la lokan lingvon aŭ lokajn kutimojn. Aliflanke, iliaj gefiloj fakte naskiĝis en la baltaj landoj kaj facile parolas la lokan lingvon. Ili ne necese konsideras Rusion kiel la patrolandon.

Tamen, ankoraŭ loĝas tie sufiĉe multaj rusoj kiuj ankoraŭ parolas la rusan kaj estas sufiĉe multaj da ili ke ili povas facile daŭre paroli la rusan lingvon en sia ĉiutaga vivo, en lernejoj, butikoj, preĝejoj ktp kvazaŭ ili loĝus en Rusio. Tio temas precipe pri regionoj apud la landlimo kun Rusio. Eĉ en 2016 la BBC faris programon en kiu ruslingvaj sendependistoj subtenataj de Rusio akaparas potencon en la regiono ĉirkaŭ Daugavpils en sudorienta Latvio. Envenas rusaj soldatoj por helpi ilin, NATO reagas, kaj komencas la tria mondmilito!



Bondezirojn al Marcel Leereveld

OKAZE DE LIA CENTA NASKIĜDATREVENO



Karaj kunvivantaj s-anoj de nia Marcel, ho preskaŭ nekredeble! Mi dum multaj jaroj admiris kaj daŭre admiras ĉiujn liajn kontribuojn kiujn mi povis legi. Kompreneble ni ĉiuj revas pri tiom “patriarka” aĝo, sed mi revas kaj deziras ke ĝuste li povu ĝui pliajn jarojn en bona san- kaj mensostato! Mi nur povas levi la ĉapon kaj klini la kapon por agnoski la meritojn de plena vivo.

Plene da estimo mi salutas lin, el la fora kontinento Eŭropo.

Utho Maier

Direktoro de la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen

Kara Marcel,

Ĉu vere vi jam estas 100-jara? Vi estas pli aktiva ol multaj pli junaj homoj.

Sendante bondezirojn al vi, mi aldonas deziron ankaŭ por mi mem:

ESK | paĝo 18 | 129 | decembro 2017

ke kiam mi atingos 100 jarojn, mi estos same vigla, kaj mense kaj fizike, kiel vi!

Kun multaj bondeziroj por via dua jarcento!

Kore,

Anna Lowenstein

Kun granda plezuro mi sendas bondezirojn el malproksima Italujo pro la centjariĝo de Marcel Leereveld, precipe gratulante pro lia mensa vicleco kiun mi spertis plurfoje okaze de interŝanĝo de mesaĝoj (ne nur pri lingvaj, sed ankaŭ pri sociaj temoj).

Antonio De Salvo

Toowoomba Esperanto-Societo gratulas Marcel pro liaj tre bonaj cent jaroj. Li estas brila gramatikisto kaj verkis multajn famajn artikolojn. Preskaŭ ĉiu aktiva aŭstralia esperantisto konas Marcel ĉar li ne nur

ĉeestis la plejparton de la kursaroj kaj kongresoj en ĉi tiu lando, sed elstare laboris en la arigoj. Ni memoras Marcel kiel la kreinton de nova tipo de ekzamenoj en Aŭstralio kaj pro tio la instiganton de multa studado.

Toowoomba Esperanto-Societo

Tulipoj el Amsterdam'

Mi unue renkontis Marcelon, mi kredas, en la belega jaro 1976 dum la Pacifika Kongreso en Melburno. Ne estis la unua fojo kiam mi renkontis nederlandan esperantiston, sed la unua fojo kiam mi renkontis iun, ĉu esperantiston aŭ ne, kiu estas tiom bonkora, facilanima, amikema kaj bonhumora kiom Marcelo.

Du jarojn poste ni renkontiĝis en Sidnejo dum la Aŭstralia Kongreso. Nia amikeco pligrandiĝis kaj ni ambaŭ bone amuziĝis. En 1980 la kongreso okazis en Adelajdo, kaj tiam mi renkontis ankaŭ la bonhumoran Kam Lee kiu tiam estis nur granda knabo!

Plurajn fojojn mi vizitis Marcelon kaj lian ĉarman edzinon Alida, kiu talente desegnis, pentris, kaj skulptis. Mi admiris ŝin tiom kiom mi ankoraŭ hodiaŭ admiras Marcelon.

Tiam ili havas grandegan dorlotbeston. Grandega virŝafego loĝis kun ili iom ekster la belega domo. Grandega kiel malgrandega elefantideto li estis. Mi pasigis multe da tempo starante karesante la grandegulon kiu ŝajnis tre ami min. Sed Alida kaj Marcelo ne permesis al mi eniri en lian enfermitejon. Li estis enfermita en kampo ĉirkaŭata de barildrato ĉar ili timis ke li, pro lia grandeco kaj forto, kontraŭvole povus

damaĝi min. Sed, kompreneble tio neniam okazis, ĉar li kaj mi estis ja bonegaj amikoj!

Mi certas ke vi ĉiuj konsentas kun mi ke ni fakte devus mendi grandegan bukedon da tulipoj el Amsterdamo kaj sendi ĝin al Marcelo, ĉar li vere meritas la plej bonan kion la vivo kapablas donaci al iu kia li! Sed, ĉar nun estas vintro en Amsterdamo, ne eblas aĉeti tulipojn. Sed, kara, eĉ karega Marcelo, estu certa ke ni ĉiuj treege amas vin pro via afableco kaj amikeco kaj pro tio kion vi ankoraŭ faras por nia kara lingvo Esperanto. Viaj ĉiusemajnaj artikoloj aperantaj en "Aŭstraliaj Esperantistoj" pravas ke vi sendube celas la plialtigon de la lingvonivelo de ni ĉiuj! Do, feliĉan naskiĝtagdatrevenon al vi de via admiranto!

Bob Felby

Aŭstralianoj estas strangaj homoj. Por komenci, ili marŝas kun la kapo malsupre kaj kun la piedoj supre, kiel scias ĉiu aĉetinto de terglobo kiu atente rigardis ĝin.

Sed pro ĉi tiuj nekutimaj ecoj, ili evidente evoluigas ankaŭ aliajn originalajn ecojn kiuj estas nepre tiel ĝenaj kiel ilia marŝomaniero. Marcel, ekzemple, iĝis unu el la plej originalaj Esperanto-sciencistoj de la lastaj jardekoj. Se anstataŭ loĝi en Aŭstralio li loĝus ankoraŭ en Nederlando, oni certe invitus lin por paroli en la malfermaj tagoj de UEA aŭ en la germanaj jarfinaj aranĝoj.

Lia populareco multe kreskus, sed lia originaleco multe suferus. Ĉirkaŭate de profundaj eŭropanoj, li



certe estus influita de ili kaj komencus pensi ke Esperanto estas speco de franca kun o-finaĵoj.

Do, bonŝance li loĝas en Aŭstralio kaj konservas sian tutan originalecon. Apenaŭ troviĝas alia Esperanto-studento kiu estas same rigora kiel li kaj kiu ne estas influita de “uzismo”. “Uzismo” estas tiu malsano kies ekstrema sekvo estas konsideri ke tio kion multaj faras pro tio mem estas ĝusta ĉu aŭ ne ĝi kongruas kun la bazaj leĝoj de Esperanto eltireblaj el la Fundamento.

Mi mem havis la privilegion renkonti lin nur unu fojon dum la kongreso en Roterdamo, sed de tiam ni restas en daŭra kontakto kaj mi konsideras lin unu el miaj instruistoj.

Dankon, Marcel, pro via ekzisto, okaze de via centjariĝo!

Amike

Via lernanto,

Renato Corsetti

Mi unue renkontis Marcel en Melburno en 1991. Mi rondvojaĝis Aŭstralion bicikle kaj dum tiu vojaĝo lernis Esperanton. Do dum mia resto en Melburno, kiel jam en Adelajdo, Perto, Darvino kaj Atertono (Atherton) mi ĉeestis Esperanto-grupojn por lerni plu. En Melburno mi iris, unu aŭ du foje, al grupo kiun Marcel instruis. Ial la plej klara memoro de tiu klaso estis kiam Marcel demandis al mi “Ĉu vi drinkas?”. En tiuj lecionoj mi tre ŝatis la rektan, klaran elparolon de Marcel.

Kaj tiel li estis. Klara kaj rekta. Sed ankaŭ justa. Mi memoris kiam li prezidis en la AEA-kunveno en Adelajdo en 2005. Li faris tion

konsiderante ĉiujn kiuj kontribuis. Kvankam li ne kunsentis kun iuj decidoj (ekzemple, okazigi la venontan somerkursaron en Tathra, NSK) li ne provis manipuli aŭ ŝanĝi la decidojn de la membraro.

Kompreneble li ankaŭ estas sperta. Kiel eviti tion je la aĝo de 100! Antaŭ ol paroli dum la pasinta kursaro en Brisbano mi petis la konsilon de Marcel, kiel kaj kion prezenti. Lia konsilo ja estis spertdevena kaj plibonigis mian prezentadon.

Tre plaĉus al mi ĉeesti la feston kun Marcel kaj samideanoj kaj mi sendas al Marcel dezirojn por feliĉa kaj sana naskiĝfesto.

Terry Manley

Ni varme gratulas vin Marcel pro via centjariĝo! Alie ol pri la lingvo ‘Esperanto’, ni daŭre admiras vian fervoran intereson pri vojaĝado, arboj kaj opero, kaj esperas ke vi povos dum jaroj ankoraŭ ĝui la vivon. Sed plej grave por la Esperanto-movado estas via instrukapablo, via lingvo-esplorado rezulte al viaj libroj kaj via insisto ke Esperanto estu vere universala kaj ne eŭropa lingvo. Estu kontenta, pacema kaj daŭre aktiva!

Sincere,

Ĵenifa kaj Alano Bishop

Kiam mi unue konatiĝis kun Marcel L., mi pensis ke mi havis ian ligan kun li kiel iama samlandano nome el Nederlando.

Sed post ĉeesto en kelkaj el Marcel klasoj, mi konstatis ĉe kiam temas pri gramatiko, absolute neniam ligo troviĝas inter ni!

Estas vere mirinde ke Marcel je la granda aĝo de 100 jaroj ankoraŭ povas klare debati/klarigi pri ia gramatika ero dum mi kiel idioto restas tute konfuzita!

Marcel estas vera Esperanta trezoro, kaj mi gratulas lin je lia 100 jara festo kaj ege ĝojas ke mi konatiĝis kun li.

Samideanino,

Indrani Beharry-Lall

Mi aŭdis pri Marcel antaŭ ol mi renkontis lin. Mi demandis min kia estas tiu membro de la Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu ekŝiĝas el organizo kleriga, eduka, kultura kies celo estas komprenemo kaj toleremo rilate al politikaj kaj filozofiaj skoloj pro gramatiko.

En 1994, kiam mi translokiĝis al Aŭstralio, mi finfine renkontis petolemetan, multfacetan viron kiu ŝatas foje patriarke konduti. Mi plezure kantis kun li anarkiistajn kantojn kiel la Internacio aŭ Ili redonu la monon al ni laŭ la melodio de “My bonnie lies over the ocean”. Se kelkaj membroj konsideras ke kristnaskaj kantoj havas sian lokon en Zamenhofa festo pro tio ke ambaŭ festoj okazas je la sama periodo, kial ne ankaŭ la anarkiistaj? Mi havas bonajn memoraĵojn de la tempo kiam okazis ĉiujara teatra konkurso inter la ŝtatoj de Aŭstralio. Mi aparte memoras Marcel kiel bestkuraciston, kun granda tranĉilo enmane kaj sangkovrita surtuto, aŭ kiel amanton de pluraj virinoj kiuj decidis sin venĝi.

De post mia konatiĝo kun Marcel mi devas konsideri Esperanton

per aliaj okuloj. Mirigas min kiom zorgeme li analizas la lingvon.

Marcel estas tre lojala, neniam traktas peton rilate Esperanton malserioze, kaj estas ĉiam preta helpi. Aĝo ne estas al li baro por akiri novajn spertojn kaj lia intereso ne limiĝas al kelkaj kampoj. Se vi komencas debaton kun la intenco venki, forgesu pri tio. Lia persistemo certe superos la vian.

Multajn pliajn jarojn da aktiva, riĉa vivo mi deziras al vi, Marcel.

Franciska Toubale

Gratulon al Marcel, kiu atingas sian 100 jaran naskiĝtagdatrevenon. Pli grave estas ke li estas ankoraŭ sana kaj inteligenta. Mi iomete estas enviema ĉar ne eblus ke mi je 100 jaroj estu sama.

Kompreneble mi renkontis Marcel antaŭ multegaj jaroj ĉar mi lernis Esperanton ĉirkaŭ la jaro 1960 kaj ni kunestis en la samaj aŭstraliaj kongresoj.

Li sendas artikolojn al la novaĵletero ekde la numero AE130. Nun li kutime sendas du artikolojn semajne. Tiuj artikoloj donas prestiĝon al la novaĵletero tra la tuta mondo.

Mi esperas ke Marcel vivos sane kaj inteligente dum multaj pluaj jaroj.

Amike

Roger Springer

Estimata Marcel Leereveld

Birdeto portis al ni la belan informon pri via longa vivo.

Kiel listano de la diskutgrupo La Bona Lingvo, el la itala urbo Padova najbare al Venecio, mi

ŝatas kune partopreni la gravan centjaran datrevenon. Estas vere do ke Esperanto favoras longan kaj riĉan vivon. Ĉiu kroma jaro via estu por ni ĉiuj kuraĝigo al monda paca kunvivado pere de Esperanto.

JoKo Rinaldo

Marcel Leereveld – Nia Amiko

Mi renkontis Marcel kaj Alida Leereveld en 1964 kiam mi unue lernis Esperanton ĉe la Melburna Esperanto-Klubo en Richmond. Same kiel nun, la klubo kunvenis ĉiun lundon. La ĉambroj en la domo enhavis diversajn nivelojn de klasoj kaj, kiel lernanto, mi eniris la klason de Alida kiu bone instruis. Post nia tepaŭzo ĉiun vesperon ĉiuj el ni eniris la plej grandan ĉambron kie Marcel gvidis konversacian grupon. Mi iam timis lin ĉar li aspektis kiel tre impresa gravulo. Dum longa tempo mi certe ne parolis al li pro mia malsperteco.

Post mia geedziĝo kun Ivan ni translokiĝis al Boronia kaj ne plu partoprenis en la kunvenoj en Richmond. Fakte, ni starigis nian propran klubon en nia hejmo. Ni fojfoje renkontis Marcel ĉe la dimanĉa bazono de St Kilda kie li vendis ceramikaĵojn faritajn de Alida.

Estis kun granda surprizo en 2003 kiam Ivan kaj mi remembris al la Melburna klubo kaj renkontis Marcel kaj Alida. Marcel daŭre instruis kaj gvidis la kunvenojn kun lia kutima entuziasmo kaj energio.

En 2008 Ivan kaj mi vojaĝis kun Marcel kaj Alida al Eŭropo kaj specife al Germanujo kaj en Nederlando kie ni partoprenis en la Universala Kongreso en Roterdamo.



Ni ĉiuj estas tre bonŝancaj ke ni havas Marcel kiel amikon, instruiston, helpanton kaj bonkoremulon en niaj vivoj. Mi esperas ke li daŭrigas en lia grava laboro gvidi nin en la plibonigo de nia bela lingvo.

Gratulojn pro atingi viajn 100 jarojn. Vivu longe Marcel!

Heather Heldzingen

Por mi, Marcel, vi estas mirinda homo. Mi unue renkontis vin en 2003 kaj min tuj inspiris via entuziasmo kaj dediĉo al la Esperanto-movado. Vi estis (kaj ankoraŭ estas) granda instruisto kaj gramatikisto, por kiu mi havas grandan respekton. Mi amis aŭskulti la historiojn pri via vivo, precipe pri via biciklado de Nederlando ĝis Hispanio por aliĝi al la Internaciaj Brigadoj. Por via 100-a jaro, mi sendas al vi multan amon kaj plej bonajn dezirojn kaj mi esperas ke vi festos multe pli da jaroj.

Esther Parris

Marcel – 100 – Vivanta Legendo

Marcel sendube estas vivanta legendo. 100 jaroj ... imagu kaj kalkulu. Mi scias ke li renkontis famajn esperantistojn kiujn ni konas nur el libroj, ekzemple Lanti. Kiam mi unue renkontis Marcel en la 90aj jaroj, li estis LA elstara esperantisto en Aŭstralio.

Kio venas en mian kapon, pensante pri Marcel?

- Longdaŭraj prezentadoj pri gramatiko, kelkfoje iomete tedaj, sed mi devis admiri (kaj ankoraŭ admiras) lian persiston ... legu iun ajn kopion de Aŭstraliaj Esperantistoj kaj vi trovos artikolon de li.

- Li ŝatas provoki homojn. Ekzemple li ofte staris sur la sapskatolo dum somerkursaro kaj komencis diskuton per deklaro ke viroj estas pli inteligentaj ol virinoj.

- Kvankam kelkfoje tre arogantajn kaj tre ĝenajn li neniam timis/as diri sian opiniojn.

- Kompreneble, li ne estas perfekta. Li povas esti sufiĉe obstina. Ekzemple, li ĉesis esti membro de SAT ĉar la redaktoro korektis la gramatikon en lia artikolo.

- Marcel estas kvazaŭ meblo dum niaj eventoj. Li ĉiam ĉeestas, li ĉiam pretas stari kaj prezenti ion, kutime ion pri gramatiko.

Ne multaj el ni atingos tiun aĝon kaj restos sufiĉe konsciaj kiel Marcel. Parolu kun li, aŭskultu liajn rakontojn, lernu de li kaj honoru nian vivantan legendon.

Sandor Horvath

Ni ĉiuj admiras la mirigan forton

kaj laboremon de Marcel kiu agis por Esperanto dum multaj, multaj jardekoj. Lia centjara datreveno estu celebrego de tiom da laboro, kaj li restu forta ankoraŭ tiom da jaroj, kiom li deziras!

Trevor kaj Katja Steele

Kara Marcel, ege respektata majstro de nia komuna lingvo, la laŭdoj ĉi tie atestas ke vi ne devas atendi ĝis post via morto por legi viajn panegirojn!! Gratulojn al cent tutplenaj, utilaj, bonaj kaj ofte belaj jaroj. Mi deziras ke vi trovu ion por ankoraŭ feliĉigi vin ĉiun pluan tagon de via mirinda vivo.

Vera Payne

As an engineer, I am interested in analysing things. In primary school, I loved parsing passages of English. Other students did not. When I started studying Esperanto, I was interested in the grammar and how it works. Other students were more interested in merely learning to use the language.

Then I met my soul-mate in Marcel! Here was someone who was/is interested in the functioning of the language, not just in its practical usefulness. We have had some interesting discussions on how Esperanto works, on the difference between the predikato and the predikativo. Our backgrounds in language are different and so our understanding is different. This is particularly true in relation to the concepts of tense and aspect in relation to participles. Then one day, this year, it occurred to me, that we

cannot say: "This is how the language works." Rather, I can say: "This is how I understand how the language works." Different people will have different understanding, but each understanding is valid. The language works/functions, independent of our understanding.

At all times, Marcel has been an inspiration by his knowledge and enthusiasm, and his desire to see Esperanto prosper and endure. The best thing we can do, to express our appreciation, is to ensure that we keep the language alive.

Ken Rolls

Ni nomas Marcel nian Esperantan heroon. La usona aŭtoro Anthony Robbins menciis ke "la historio de la mondo estas simple kroniko pri la faroj de malgranda nombro da ordinaraĵoj homoj, kiuj havis eksterordinarajn nivelojn de devontigo. Tiuj individuoj, kiuj havis la povon fari signifan diferencon en la kvalito de niaj vivoj, estas la viroj kaj virinoj, kiujn ni nomas herooj".

Dalai Lamao diris ke "nia estonteco dependos de nia agado de Karmo ĝuste en ĉi tiu momento". Li instigas nin esti konsciaj kaj fari saĝan elekton de agado ĝuste en ĉi tiu momento.

En ĉi tiu senso, la 100 jaroj de la vivo de Marcel estis videble dediĉitaj al la Esperanto-movado kaj kondukis nin komencantojn en la mondon de ĉi tiu lingvo kiel luma domo en la malhela oceano.

Torquay Esperanto Coffee Club ĝuis la partoprenon de Melburnaj esperantistoj ĉe la monata renkontiĝo en novembro 2015. Kaj ni memoras

Marcel kiel Esperanto-superhomoo!

Gratulojn Marcel pro viaj 100 jaroj!
Gary kaj Marumi Smith

Estimata Marcel, la Brisbana Esperanto Societo gratulas vin ke vi iĝas centjarulo! Vi sukcese atingas tion pri kio la plej multaj el ni povos nur esperi kaj sonĝi.

Multaj el niaj membroj de la Brizbana Esperanto Societo legas, ŝatas, kaj instruiĝas de viaj kleregaj artikoloj kiujn vi skribas por la "Aŭstraliaj Esperantistoj". Estas evidente ke vi legas tre larĝe kaj pensas tre profunde...

Doug Eising

Rimarko de la redaktanto:

Karaj legantoj, bonvole atentu pri la traduko por 'birthday'. Homo havas nur unu naskiĝtagon kiam li/ŝi eniras ĉi tiun mondon. Tiu estas la sola naskiĝ (birth) tago (day). Jarojn poste en la sama dato estas la datreveno de tiu naskiĝtago. Tiel, 'birthday' en Esperanto estas naskiĝdatreveno.



Konsultado kaj obeado (parto 2): Parizo parolas

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

Unu jardekon antaŭ ol komenci siajn famajn vojaĝojn tra okcidentaj landoj antaŭ la Unua Mondmilito Abdu'l Baha en Hajfo al kelkaj pilgrimantoj diris: "La diferencoj inter ĉi tiu Revelacio kaj tiu de Jesuo Kristo estas ke en ĉi tiu ciklo ĉiuj loĝantoj de la mondo kolektiĝos en unu nacion; universala paco triumfos, sangoverŝado kaj militoj ĉesos; ekzistos universala lingvo; kuniĝo kaj harmonio atingos siajn plej altajn statojn."

Ligi Esperantismon kun Bahaismo estas al mi pasio. Tamen, mia artikolo ne projektas oficialan pozicion flanke de la koncernaj movadoj. Ne pafu la mesaĝiston, gekaraj! Miaj junaj filoj malĝoje ploregus sopire por sia maljuna paĉjo! Bonvolu tamen engaĝiĝi por konsulti, refuti, kaj eĉ laŭgrade por pridisputi; kelkaj miaj samreligianoj tion faras - malsukcese ĝis nun - kaj ni ĉiuj ankoraŭ restas amikoj!

La 12-an de februaro 1913, dum esperantista festeno en Hôtel Moderne Abdu'l-Baha lekcias. Gvidas la kunvenon la prezidanto de la Pariza Esperanto-Societo, M. Bourlet (profesoro pri matematiko), helpata de Hippolyte Dreyfus-Barney (la unua franca bahaano) kiu tradukas el la persa gratul-vortojn de la bahaa estro. Li vortigas nekutiman dankemon: "Mi al vi estas ege danka kaj gratulas vin pro ĉi tiuj fervoraj klopodoj, ĉar vi kolektiĝas ĉe ĉi tiu bankedo en sindona sinteno por pluigi ĉi tiun grandan projekton. Via espero estas doni gravegan servon al la mondo de la homaro, kaj pro ĉi tiu tre sincera celo mi gratulas vin de la profundo de mia koro." La vortoj de Abdul Baha je ĉi tiu momento estas aplaŭdataj dum li marŝas tien kaj reen en la salono, haltante por emfazi kun ofta gesto.



56 000 gasaj lampoj lumigas la stratojn de Parizo en la 1860-aj jaroj; tiel la nomo "La Urbo de Lumoj".

En la urbo de lumoj en la lando de miaj prapatroj Abdul Baha al francaj esperantistoj tre gratulas! Se ni aŭ niaj antaŭuloj proklamis ĉi tiun lingvon laŭ liaj petoj, eble reala paco jam ekzistus kaj Har-Magedon estus nura fantazio. Silento pri la lingva problemo maldecas al la homaro; por bahaano eviti la demandon estas honto. "Homoj iam estas mastroj de siaj sortoj. La kulpo, kara Bruto, ne estas en niaj steloj. Sed en ni mem, ke ni estas subuloj." (*Julio Cezaro*, akto 1, sceno 2).

Kun etaj variantoj de traduko kvin versioj de tiu ĉi grava parolado aperas en bahaaj eldonaĵoj kiujn oni vaste kaj saĝe utiligas ĝis la nuna tago.

Danke plejparte al la diligenteco de D-ro Greg Meyjes kaj pro liaj talentoj multlingvaj, la primara eldonejo de bahaismo publikigis en 2015 bonegan kompilaĵon pri la principo de universala helpilo: *The Greatest Instrument for Promoting Harmony and Civilization* (TGI). Konsekvence, bahaanoj scipovantaj la anglan lingvon finfine konstatas kaj apenaŭ rajtas nei, samkiel iuj fakuloj de la persa lingvo jam dum multaj jardekoj komprenas, ke en diversaj eŭropaj kaj nordamerikaj ĉefurboj Abdul Baha, ne nur vorte dankas la esperantistojn, sed ankaŭ, kiel atestita antaŭ la Granda Milito en ekzistanta dokumento direktita al iu D-ro Fareed, kiu en 1910 kongresas en Vaŝingtono, skribe konfirmas tiun dankemon kaj eĉ profetas ke ĉiuj bahaanoj studos Esperanton kiel religia devo: "Se eble renkontiĝu kun D-ro Zamenhof kaj montru al li la *Kitab-el-Aqdas* (Libron de Leĝoj) kaj traduku la version, kiu koncernas la Universalan Lingvon kaj diru al li: Ĉi tiu klara verso, kiu estis rivelita antaŭ kvardek kvin jaroj, estos la katalizilo por disvastigi vian Universalan Lingvon tra la tuta

Oriento. La bahaanoj konsideros la studadon de ĉi tiu lingvo kiel neevitebla devo al ili, kaj ĝi estos por ili religia devo. Sekve, viroj, virinoj kaj infanoj, ĉiuj akiros ĝin."

La promeso de Abdu'l-Baha pri proklamado de la Zamenhofa lingvo en la tuta Oriento estas ligita al la lasta paĝo de la ĉefa baha libro, *Kitáb-i-Aqdas* (Libro de Leĝoj de Baha'u'llah), 1873: "Ho membroj de la Parlamentoj tra la mondo! Elektu vi unu lingvon por la uzo de ĉiuj surtere kaj adoptu vi same skribon komunan. Dio, vere, igas evidente al vi el kio vi profitas kaj ebligas al vi esti sendependaj de aliaj. Li, vere, estas la Plej Malavara, la Ĉio-Scianta, la Ĉio-Konanta. Tio ĉi kaŭzos unuecon, se nur tion kapablus vi kompreni, kaj montriĝos la plej granda ilo por igi antaŭen harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu! Ni indikis du signojn de la plenkreskiĝo de la homa raso: la unuan, la plejfirman fundamenton, Ni skribis sur alian el Niaj Tabuletoj, la dua estas rivelita en tiu ĉi mirinda Libro."

En letero skribita por individua kredanto (la 30an de januaro 1926) oficiale en la nomo de la sola kaj plenaŭtoritata Gardanto de bahaismo, Shoghi Effendi, (elpersigita de d-ro Meyjes por sia ilumina TGI kaj siavice sankciita de la Universala Domo de Justeco) tre malutila miskompreno flanke de la bahaanaro finfine eksvalidiĝas: "Rilate Esperanton la afero estas nekutima, ĉar ĝi estas facila lingvo en ĝiaj skribaj kaj parolaj formoj. Se la bahaanoj lernus ĉi tiun lingvon, la rezultoj estus gajni pli grandan senton de amo kaj unueco inter ili kaj faciligi promocion de la bahaaj instruoj malkaŝitaj por la Nova Aĝo fare de la Glora Reĝo. Do, faru vian plej grandan klopodon en ĉi tiu

laŭdinda entrepreno, por ke vi estu kernaj roluloj por disvastigi aromojn de la Dia Revelacio kaj ke vi donu ĝojon kaj feliĉon al la koroj de la bahaanoj.”

SED, TRE HONTE, TRE MALMULTAJ BAHAAJ ESTROJ NOMAS SIN ESPERANTISTOJ!

Alidirite, meze de la dudekaj jaroj de la lasta jarcento la esperantistaro jam estingis la absurde sed damaĝe ripetitan kaj tro emfazitan zorgon de Abdu’l-Bahá de 1911 pri ia malfacileco de Esperanto: “Esperanto kiel ĝi staras estas tre malfacila por iuj homoj.” Alivorte, okulfrape, ofta referenco far bahaaj estroj al tiu iama zorgo de Abdu’l-Bahá kiel kialo por eviti Esperanton estas malvalida jam dum 91 jaroj. Memevidentas tamen, kiam TGI aperis, ke ĉiuj bahaanoj, ĉu iran-devenaj ĉu parolantoj de la angla, devas studi Esperanton kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo.

“Kian profiton donas konsentado ke la universala amikeco estas bona, kaj parolado pri la solidareco de l’homaro, kiel pri granda idealo? Tiuj pensoj estas senutilaj, se ili ne estas transkondukitaj en la mondon de agoj. La malbono daŭras en la mondo ĝuste pro tio ke homoj nur parolas pri siaj idealoj, kaj ne ekpenas praktiki ilin. Se agoj anstataŭas la vortojn, la malfeliĉo de la mondo baldaŭ ŝanĝus sin en feliĉon.” (‘Abdu’l-Bahá, *Parizaj Paroladoj* paĝo 9, la unua ĉapitro. Tradukis: Lidia Zamenhof)

Dek-kvin monatojn antaŭ sia parolado en Hôtel Moderne Abdu’l-

Baha Parizon ankoraŭ foje elektas por rekomendi la lingvon de la monda paco, la rolon de altega Tribunalo kaj sian plej saĝan konsilon tiucele: ‘Aprezu Esperanton!’ (*Parizaj Paroladoj*, paĝo 88 Esperantigis: Lidia Zamenhof) kiu ĝuste en tiu tempo uzas ‘Respektu Esperanton!’ anstataŭ mian neologismon de la angla traduko de Damo Sara Blomfield bazita je la surloka laŭvorta traduko, t.e. franclingva: ‘Appreciate Esperanto!’. (Abdul Baha perse parolas, gesinjoroj Dreyfus-Barney francigas por la aŭskultantoj, Damo Sara Blomfield frue en 1912 aperigas anglalingvan eldonon kiun Lidia Zamenhof utiligas por la Esperanto-versio unuafoje aperinta en 1932, Germanujo.) (https://eo.wikipedia.org/wiki/Parizaj_paroladoj_de_Abdul_Baha)

“Se iu asertas, ke la vero estas per li kaj prezentas siajn pruvojn, tiuj kiuj volas refuti lin devas montri pruvojn same validajn kiel liaj. Se ili sukcesos, liaj vortoj montriĝos vanaj kaj ili venkos; alikaze liaj vortoj ne ĉesos kaj liaj pruvoj ne vaniĝos. Mi admonas vin, ricevintojn de *La Bayan*, se vi volas aserti vian pravecon, kontraŭstaru nenium se vi ne montras pruvojn similajn al liaj, ĉar la vero staras firme, dum ĉio alia certe pereos.” (*La Bayan* estas la ĉefa verko de la Báb.) (Báb, *Kitab-i-Asma*. XV11.11. (Libro de Nomoj.) Tradukis: Trevor Steele)

Senpage havebla en la Zamenhofa lingvo de la Universitato de Georgio, Usono: http://bahai.uga.edu/Realigas_la_Mondan_Pacon.pdf.

Anoncoj

Saluton, mi estas Joel Muhire, e-muzikisto el D R Kongo, Afriko. Mi serĉas korespondamikojn el la tuta Nov-Zelando. Ĉio detala pri mi troveblas en www.senopone.wordpress.com.

Amike, Joel (joelmuhire0@gmail.com)

Promesplena paŝo pri instruado de Esperanto

Jen du leteroj kiujn sendis Paul Desailly el Adelajdo pri kontakto kun loka parlamentano pri la instruado de Esperanto en Aŭstralio. Ni esperas ke Paul havos sukceson pri ĉi tiu afero.



Katrine Hildyard MP

Member for Reynell

29 September 2017

Mr Paul Desailly
20 Woocalla Street
O'SULLIVAN BEACH SA 5166

Dear Mr Desailly

I hope you are well.

Thank you for speaking with a member of my team about your concerns with language education in our schools.

I found the information that you passed on about the Esperanto language very interesting.

I have written to the Minister for Education and Child Development, the Hon Susan Close MP, about how you would like to see our language curriculum overhauled, so that there is an emphasis on languages of our key partners in the Pacific Rim and the inclusion of Esperanto in the curriculum as an easy to learn universal language.

Please find attached a copy of the letter I have written on your behalf to the Minister.

Please do not hesitate to get in touch if I can further assist with this or any other matter. I would be very happy to support you.

Kind regards

KATRINE HILDYARD MP

Member for Reynell

Enc Letter to the Minister for Education and Child Development re language curriculum

198 - 200 Main South Road
Morphett Vale SA 5162
PO Box 127
Lonsdale DC SA 5160

T 8382 0409 F 8384 3470
E reynell@parliament.sa.gov.au
✉ [@KatrineHildyard](mailto:/katrinehildyardforreynell)





Katrine Hildyard MP

Member for Reynell

COPY

29 September 2017

The Hon Susan Close MP
Minister for Education and Child Development
GPO Box 1563
ADELAIDE SA 5001

Dear Minister

I hope you are well.

I write on behalf of Mr Paul Desailly of O'Sullivan Beach regarding changes he would like to see made to our language education curriculum.

Mr Desailly has a history in English in instruction in China, and speaks the languages Mandarin and Esperanto fluently.

Mr Desailly would like to see Esperanto included in our language curriculum and actively promoted. This is because, in its design, Esperanto is an easy language to learn and become fluent in, which gives students a grounding in the linguistic techniques that they need to go on and study other languages both at school and in later life.

Further to this, Mr Desailly would like to see further instruction in language of our key partners in Asia, such as Mandarin, Indonesian, Hindi and other Asian languages, as opposed to European languages. Australia trades most strongly with its partners in Asia, and because of this, Mr Desailly would like to see those languages promoted. There are also higher populations of many Asian language speakers as their first language in Australia, as opposed to European languages.

Could you please investigate Mr Desailly's suggestions for our education? I look forward to your response at your earliest possible convenience.

Please do not hesitate to contact me should you require any further information about the content of this letter.

Kind regards

KATRINE HILDYARD MP
Member for Reynell

CC Mr Paul Desailly

198 - 200 Main South Road
Morphett Vale SA 5162
PO Box 127
Lonsdale DC SA 5160

T 8382 0409 F 8384 3470
E reynell@parliament.sa.gov.au
F /katrinehildyardforreynell
T @KatrineHildyard



Working for our Community



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

Chris Krageloh | Secretary

Dave Dewar | Assistant Secretary

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Zhou Mack Mafuila



dua trilanda
kongreso de esperanto

SECOND TRINATION ESPERANTO CONGRESS



The international language,
Esperanto:
the simplest language to
learn!

Use it to travel the world, or as
a kick-starter for more difficult
languages. For more information
on events, please visit our
website:

aea.esperanto.org.au

- Esperanto classes in two levels
- Theatre and music, concert by Zhou Mack Mafuila
- Esperanto exhibition
- Banquet
- Excursions
- Lectures about Esperanto and other topics

28 Mar - 2 Apr
2018



EXCURSIONS

Enjoy pre and post congress
excursions to Anyer and Bali,
and experience the natural
wonders of Indonesia



**BEKASI
INDONESIA**